

Maria kaj la batalo kontraŭ la malbono

*“Kaj ankaŭ vian animon
glavo trapasos...”(Lk. 2,35)
biblia pliprofundigo pri la
kontraŭmeto inter la malbono
kaj la Evangelio.”*

La problemo de la malbono ekde ĉiam akompanas la homan realaĵon; oni konsideras ĝin kiel tion kio “ne devus esti” kaj kiu damaĝas la vivon. Sekve temas pri antropologia fenomeno kiu estas malnova kiel la homo mem, kaj kies kompreno ofte aperas malfacila ĉar ĝi starigas demandojn al kiuj ne estas facile trovi respondojn.

La religia sperto klopodis diversmaniere alfronti la problemon pri la kialo de la ekzisto de la malbono, vidante ĝin kiel enigmon aŭ misteron kiun oni devas akcepti kaj antaŭ kiu oni ofte devas silenti, evidentigante la konflikton inter la bono kaj la malbono, inter la dia povo, kiu tendencas protekti kaj savi tiun kiu fidus je Dio, kaj la ĉeesto de malbono kiu disversigas kaj kaŭzas daŭre suferon. Ekde la plej fora antikveco estis la grandaj religioj kiuj klopodis ekspliki la malbonon, lokalizinte ĝian

ekziston en homaj situacioj kaj sintenoj taksitaj kiel “pekaj” kaj konsideritaj kiel nocaj por la homa vivo kaj por la socia medio. Sekve, karakterizaĵo de la religia praktikado estis certigi la protektadon de la fideluloj fronte al ĉiu formo de malbono pere de la plenumo de normoj kaj ordonoj kiuj, konsideritaj kiel fundamento de la dia beno, kondukis eksenti la malbonon kiel mankon aŭ neplenumon de tiuj ĉi lastaj. La batalo kontraŭ la malbono kiel kaŭzo de malordo kiu malhelpis la komunecon kun Dio, kaj povis detruigi la homan personon, tial transformiĝis en batalon kontraŭ la peko konsiderita kiel malobservo de la ordonoj kaj de la normoj fiksitaj de la religio. En la evangelia mesaĝo la malbono estas indikita kiel tio kio malhelpas la kreskon kaj la efektivigon de la homa personeco. Jesuo neniam petos al siaj disĉiploj batali kontraŭ ĝi, sed li petos al ili konsenti pri sia projekto je pleno da vivo por komplete forigi la malbonon. La vido ofertita de Jesuo pri Dio kiu estas senlima amo (Mt.5,45) kiu pardonas senkondiĉe (Lk. 15,11-32) kaj kiu deklaras “benitaj” tiujn kiuj eĉ sen Lin koni klopodis mildigi la suferojn de la

aliuloj (Mt. 25,31-45) tiu garantias la venkon kontraŭ la malbono.

*La virino kaj la serpento
La ĉefanĝelo kaj la drako*

En la katolika tradicio la figura bildo pri la batalo kontraŭ la malbono estis kunigita al du rolantoj kiuj apartenas kaj al la dia kaj al la homa sferoj.

Fakte, unuflanke ĉeestas la bildo de la ĉefanĝelo Miĥaelo kiu batalas kontraŭ Satano sub la aspekto de drako, kaj ĝin regas, aliflanke ĉeestas la bildo de la Virgulino Maria kiu piedpremas per la kalkano la kapon de la serpento.

Tiuj ĉi estas bildoj kiuj havis grandan pritrakton en la kristana ikonografio. La artistoj ĉerpis inspiron el du tekstoj de la Santaj Skriboj, kiuj, kurioze, malfermas kaj fermas la kristanan kanonon: por la bildo de Maria kiu piedpremas la kapon de la serpento la artistoj inspiriĝis al la teksto de Gen. 3,15:


«Mi metos malamikecon inter vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon»

dum por la batalo inter Miĥaelo kaj Satano la fonto ĉerpita el la Sanktaj Skriboj estis Apok. 12,7-9: «Fariĝis milito en la ĉielo: Miĥael kaj liaj anĝeloj ekmilitis kontraŭ la drako; kaj militis la drako kaj ĝiaj anĝeloj; kaj ne prosperis al ili, kaj ne plu troviĝis ilia loko en la ĉielo. Kaj ĵetiĝis malsupren la granda drako, la antikva serpento, nomata Diablo kaj Satano, la trompanto de la tuta mondo; ĝi ĵetiĝis sur la teron, kaj ĝiaj anĝeloj ĵetiĝis kun ĝi».

Ambaŭ tekstoj, kiel enmeto, prezentas realaĵon strikte ligita kun la homa estaĵo (la virino kaj ŝia idaro/ la ĉielo kaj la tero), ĝi estas karakterizita de daŭra minaco al la malbono. La profetaĵo de Gen. 3,15 anoncas la venkon kontraŭ la serpento kaj la teksto de Apok. 12,9 konfirmas tiun malvenkon de la malbono.

En la kristana kanono de la Sanktaj Skriboj, tiu ĉi literatura enmeto komprenigas kiamaniere la malbono, bildigita kiel serpento/ drako, pere de siaj minacoj havas neniun povon sur la homa estaĵo, nek ĝi povas sin glori pri regado kiu lin malhelpu atingi lian efektivigon. La forto de la serpento/ drako troviĝas nur en la kapablo allogi kaj trompi, pro tio oni ne devas sin delasi al ĝiaj allogoj, nek cedi sub ĝiaj insidoj. La rakontoj de Gen. 3,15 kaj de Apok. 12,9 konfirmas la tutan senkonsiston de la malbono kaj ĝian imponon nur pere de la ŝajnoj.

Se la kondiĉo por atingi la plenan homan realigon troviĝas en la ne falado en la intrigojn en kiuj la serpento/ drako kapablas impliki la homojn, la homo ne devas engaĝi siajn energiojn en



La Sankta Virgulino glorigita inter Sankta Tomaso el Villanova kaj Sankta Francisko de Sales. Karlo Maratta (1671), Siena, preĝejo de Sankta Aŭgusteno.

iu ajn batalo, sufiĉas ke li konsciu pri la malpleneco de la malbono kaj ke li ne aniĝu al ĝiaj okazintaĵoj.

La idaro de la virino

La kristana ikonografio kaj iu kultado tre disvastigita pri la maria devoteco bildigas Marian kiel la protektantinon de la fideluloj fronte al la danĝeroj kiuj ilin minacas, Madono al kiu sin turni por eskapi el malbonoj kiuj estas super ili. Tiu ĉi bildo estas pravigita de malĝusta traduko de Gen. 3,15, kiu kredigis ke estos la virino kiu piedpremos la kapon de la

serpento anstataŭ ŝia idaro. Tiu ĉi miskompreno, kiam oni aplikis la profetajn vortojn de Genezo al la naskiĝo de la Savanto, okazigis la bildigon de Maria dum ŝi trafas la serpenton per la kalkano.

Verdire en la versikloj de Genezo 3, 15 la kapo de la serpento ne estas piedpremata de la virino, sed de ŝia semo aŭ de ŝia idaro. Estis Sankta Hieronimo kiu tradukis la viran hebrean pronomon *hû* uzante la virinan formon, kaj anstataŭ legi la viran pronomon, sin referante al (*la idaro*), li tradukis la inan formon (*la virino!* «*ŝi frapados vian kapon*»). Kontraŭe, en la teksto

oni diras ke estos la idaro de la virino (kaj ne la virino mem) kiu piedpremos la kapon de la serpento.

La ĝusta legado kaj interpretado de Gen. 3,15, metante je la atentocentro ne la bildon de la virino sed tiun de ŝia idaro redonis al Jesuo lian rolon de ununura savanto kaj liberiganto, de venkinto kontraŭ la malbono pere de la donaco de la vivo mem (Joh. 16,33), temas pri donaco kiu trovas sian plej grandan esprimon sur la Kruco. La teksto de Genezo ricevas sian plenan konfirmon kaj realigon en la paĝo de Apok. 12, kie la vira filo naskita de la virino vestita per la suno (bildo de la Eklezio kiu travivas en plena agordo la amon de la Patro) estas kondukita antaŭ la trono de Dio por ricevi la reĝecon sur ĉiuj landoj.

La rakonto de Apok. 12 memorigas ke ekde kiam la vira filo estis suprenlevita ĝis la gloro de Dio, tuj plenumiĝas tia skuego en la historio ke la homa realaĵo ne plu estas la sama kiel la antaŭa. La drako, ĵetita sur la teron, ne plu estas antaŭ Dio.

«...militis la drako kaj ĝiaj anĝeloj; kaj ne prosperis al ili, kaj ne plu troviĝis ilia loko en la ĉielo. Kaj ĵetiĝis malsupren la granda drako, la antikva serpento, nomata Diablo kaj Satano, la trompanto de la tuta mondo; ĝi ĵetiĝis sur la teron, kaj ĝiaj anĝeloj ĵetiĝis kun ĝi. Kaj mi aŭdis grandan voĉon en la ĉielo, dirantan: Nun fariĝis la savo kaj la potenco kaj la reĝeco de nia Dio, kaj la aŭtoritato de Lia Kristo; ĉar ĵetiĝis malsupren la akuzanto de niaj fratoj, kiu tage

kaj nokte akuzas ilin antaŭ nia Dio...» (Apok. 12, 7-10).

Sekve la malbono restas limigita al surtera sfero kaj ĝi respondecas pri la mortodinamikoj, pri maljustaĵoj kaj sufero kiuj kreiĝas en ĝia eno. Pere de la enkarniĝo de la Vorto oni eniras tiun epokon de la homa historio kiu estas la lasta kaj definitiva en kiu la plano de la Patro atingos sian celon de pleneco, nome la neniigon de ĉiuj formoj de malbono: «kaj Li forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis» (Apok. 21,4).

La komunumo de la kredantoj

En tiu plano la komunumo de la kredantoj estas vokata esti atestanto, kiel Maria, de la Kristo kaj de lia vorto. Sekve, la personeco de Maria en la vivo de la komunumo ne devas esti taksata pere de la konturoj de "lukto" aŭ de "batalo", sed kiel atesto pri la fakto ke laŭgrade estas indikita en la historio la efektivigo de la dia plano pri savo.

Ekde kiam Jesuo sin montris kiel la lumon de la mondo (vd. Joh. 8,12; 9,5) kaj li indikis la disĉiplojn kiel esprimon de tiu ĉi lumo (vd. Mt.5,14), la tasko de la komunumo de la kredantoj ne estas batali kontraŭ la mallumo, sed brilegi. La mallumo ne povas supervenki la lumon kies brilo estas signo je vivo kaj espero.(vd. Joh. 1,5). Konforme al la disvastigo de la propono de la Regno sur la tero kaj al ties akcepto fare de la homo, tuj defalos tiuj organizaĵoj kiuj kontraŭas la bonon de la homo.

Estas la amo per kiu la Patro sendis en la mondon la Filon kiu neniigos ĉiujn formojn de malbono: «Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidis al li, ne pereu, sed havu eternan vivon» (Joh.3,16).

La enkarniĝo de la Vorto implicas la kapablon kontempli lian gloron, por ĉiuj kiuj ĝin akceptas, kaj fariĝi tiamaniere filoj de la sama Dio (vd. Joh. 1,12.14). En Maria tiu ĉi akcepto sin montris ne nur en la momento de la koncipito, sed dum la tuta vivo kiam Ŝi alfrontis sin kun la vorto de la Filo (Lk. 2,19.51), donante sian konsenton al ĝi kaj ĝin atestanta per fideleco kaj kuraĝo.

Tiu vorto, kiun oni indikis al Maria kiel glavon kiu trapasos ŝian vivon (Lk. 2,35) devigante ŝin al elektoj tiom dramaj kiom dolorigaj, sed kiu permesis al Ŝi kreski en la fideleco, ĝuste ĝi suprenirigos ŝin de patrino de Jesuo al ina disĉiplo de Kristo.

Kiel akirigita glavo kiu nete tranĉas por forigi tion kiu kontraŭas la homan bonon kaj ĝojon, la evangelia mesaĝo evidentigas la novaĵon de la plano de pleneco je vivo kiun Dio oferdonas al la homaro: nova ĉielo kaj nova tero kie ne plu ekzistos la malbono. (vd. Apok. 21,1).

En tia plano Maria ĉeestas kiel perfekta atestantino pri kio Jesuo realigis pere de lia personeco kaj ŝi instigas la kredantojn sammaniere atesti tion per ilia vivo mem partianiĝinte kun la plano de Dio.

Se la radiko de la malbono troviĝas en la rifuzo de la homa estaĵo akcepti lian limigon, pretendante voli esti kiel Dio

(vd. Gen. 3,5), kun Jesuo, kiu estas la pleno de la homaro, tia trompo estis elradikigita, tiel nur kreskinte kiel homa estaĵo kaj aliĝinte al ekzemplo kiun li oferdonis per sia persono mem, la homa estaĵo atingas la dian kondiĉon. Neniu batalo kontraŭ la mallumo kaj ĝiaj senditoj, sed la konscio esti viroj kaj virinoj kiuj, kiel Maria, estis rekonintaj Jesuon «lumo de la mondo» (Joh. 8,12) kaj scias brilegi en la historio per agoj de kompatemo kaj tenero. Tiuj ĉi superas ĉiujn formojn de malbono, ĉar ili vivas la komunecon kun la ĉiela Patro, kies amo plene manifestiĝis en la persono de la Filo kaj daŭrigas esti senmezure disvastigita pere de lia Spirito.

*Ricardo M. Pèrez Marquez osm.
Centro pri bibliaj studoj «G.
Vannucci» (Montefano (Mc.)*